ESPERANTO

N-RO 206, APERAS DUSEMAJNE

# Eventoj

Redakcia adreso:
Budapest, pk. 87.
HU-1675 Hungario
Tel: +36-1-2828885
eventoj@esperanto.org

*La plej ofta internacia gazeto pri la Esperanto-movado* — *2 / marto 2001*

## 2 PERSONOJ SENPAGE AL IJS

Melinda Szekeres estis fervora, juna esperantistino, membro de Hungara Esperanto-Junularo, HEJ. Ŝi mortis en februaro 2001. Honore al ŝia memoro la gepatroj ekde nun ĉiujare subvencias partoprenon de 2 junaj esperantistoj en la plej granda mez-eŭropa junulara arango, IJS.

Al la subvencio de "Premio Melinda" povas aliĝi junaj esperantistoj, se ili estas:

- studentoj aŭ lernantoj
- aŭ ili estas el t.n. B-landoj (ekz. iamaj socialismaj landoj)
- kaj bone parolas Esperanton aŭ diligente partoprenas en la internaciaj kursoj dum IJS.



Se vi volas kandidatiĝi al la subvencio de "Premio Melinda", sendu vian sinprezenton (kun via IJS-aliĝilo) al:

*Fondaĵo Esperanto ĉe Eventoj*
*pk. 87*
*HU-1675 Budapest, Hungario*
*Rete: eventoj@esperanto.org*

## ESPERANTO EN LA ANTARKTO!

"De ni, nuntempuloj, dependas la estonteco de Esperanto. Se ni faros nenion, pri Esperanto memorigos eble nur muzeoj, bibliotekoj kaj la subneĝa Mesaĝo por venontaj generacioj, metita en Antarkto la 27-an de aprilo 2000 memore al Monda Scienca Pintkunveno -- danke al aktivuloj de Argentina Esperanto-Ligo unu el la kvin lingvoj de la mesaĝo estas Esperanto."

*alineo el "La Ondo de Esperanto"*

## ARBARO DE ZAMENHOF

En norda Finnlando en komunumo Taivalkoski en vilaĝo Metsäkylä troviĝas sufiĉe nova *Arbaro de Zamenhof*. Oni eniras la Arbaron tra enirejo sub ligna ŝildo pendanta inter du piceoj.

De kie oni scias, ke oni venis en la *Arbaron de Zamenhof,* krom de la enireja ŝildo? Vere tio estas rimarkebla! La unua ŝildo, kiun oni rimarkas ĉe la loko montras la *Arbon de egaleco*. La tabula ŝildo pendas sur iu branĉo de interesa piceo, kiu havas du egalajn trunkojn sur komuna bazo. Poste oni vidas aliajn ŝildojn: *Arbo de paco, Arbo de homaj rajtoj, Arbo de Finnlando, Arbo de Hungario* kaj kelkaj aliaj landoj. La arboj estas dediĉitaj al tiuj landoj de kie venis esperantistaj gastoj en Metsäkylä. La nombro de arboj de landoj kutime kreskas, kiam alvenas vizitantoj el novaj landoj en la vilaĝo.

La ekzisto de Arbaro de Zamenhof devenas de Aini Vääränieni, kiu estas la esperanto-aktivulo en Metsäkylä. Ŝi instruas en lernejoj kaj okupiĝas pri tio, ke oni konatiĝu kun Esperanto.

Oni esperu, ke la *Arbaro de Zamenhof* fariĝu pli multarba kaj ke Aini daŭre havu entuziasmon disvastigi nian komunan lingvon.

*Sylvia Hämäläinen*

## ESPERANTO INSTRUATA DUM 4 JAROJ

Estas instruata Esperanto al lernantoj de privata lernejo Savoir en Lome, Togolando. La lernantoj havas unu Esperanto-lecionon semajne. Al ĉiuj estas devige lerni Esperanton de la 1-a ĝis la 4-a klaso.

*Gbeglo Koffi*
*Rete: esp.togo@cafe.tg*

## ĈEHA ALVOKO HELPAS ESPERANTON

Ministerio pri edukado kaj junularo de Ĉehio faris alvokon al la lernejoj okaze de la *Eŭropa jaro de lingvoj*. Laŭ la alvoko la ministerio instigas al lernado de lingvoj ne unuavice pro ekonomiaj kialoj. La lernado okazu por plivastigo de kulturaj, socialaj, porpacaj kaj pordemokratiaj celoj. La instuado servu toleremon, ekkonon de aliaj kulturoj, de aliaj lingvokomunumoj. La alvoko celas ne nur la lernantojn, sed ankaŭ la gepatrojn.

La alvoko prezentas ankaŭ ekzemplojn: agado en lernejaj gazetoj, kreo de lingvaj mapoj, aranĝo de diskutrondoj, fondo de lingvaj kluboj, de korespondaj retoj, de lingvokursoj, kunlaboro kun lokaj kulturaj institucioj, aranĝo de lingvaj foiroj.

## VESPERTO 100

Antaŭ naŭ jaroj naskiĝis la literatura folio Vesperto. La redaktanto Apáti Kovács Béla ĝis nun gardis la malnovtipan komputilan verzion, do la eksteraĵo estis ne tro bela, sed la enhavo bonkvalita. Nun alvenis la 100-a numero. Ekde nun kunlaboras en la redaktado Jozefo Baksa, kiu multe helpis pretigi la jubilean numeron.

Kiu deziras paperan version, bonvolu turni al la redaktanto:

*Apáti Kovács Béla, Béla király u. 44.*
*HU-7400 Kaposvár, Hungario*
*Rete: adalber1@matavnet.hu*

## ĜEMELURBA PROJEKTO

En la novembra kunsido de kelkaj prieŭropaj aktivuloj en la Centra Oficejo oni decidis instigi lokajn klubojn al uzo de Esperanto en ĝemelurbaj kontaktoj. Temas pri agado kadre de Eŭropa Jaro de Lingvoj, EJL sed tiu agado kompreneble devus daŭri ankaŭ poste.

Prieŭropaj aktivuloj instigas peti eŭropan subvencion por la kluba projekto. Povas esti, ke multaj ne kuraĝas eĉ nur pensi pri tia eblo pro manko de sperto pri tiaj burokratiaĵoj. Tamen, espereble tio ne fortimigos tiom ke oni rezignus pri eĉ nur modesta provo fari ion. Konante niajn homojn mi timas, ke oni jam fortimigis esperantistojn de partopreno en EJL, ĉar el la ĝisnunaj diskutoj multaj povis facile ricevi la impreson, ke ili estas tro simplaj, kamparanaj kaj diletantaj por partopreni en tiel altfluga entrepreno.

### Esperanto-kluboj en Eŭropo

Ĝemelurba projekto kadre de Eŭropa Jaro de Lingvoj 2001

Dum la UK en Tampereo en 1995 oni akceptis kadre de Eŭropa Esperanto-Unio laborplanon por la Laborgrupo pri la Lingvoproblemo en Eŭropa Unio (EU).

Ĝia paragrafo 13 pri ĝemeliĝoj tekstas jene:

"Por pligrandigi la ŝancojn por la uzado de Esperanto kaj por montri ke komunikado pere de Esperanto facile funkcias, ĉiu asocio faru aranĝojn por realigi Esperanto-kontaktojn kadre de ĝemelaj rilatoj inter urboj, vilaĝoj, unuiĝoj, samfakanoj k.s. Multaj urboj aŭ vilaĝoj jam ĝemeliĝis sed la rilatoj plurfoje ne sukcesas aŭ nur dormetas pro la lingvo-problemo. Ofte troviĝas ambaŭflanke Esperanto-parolantoj. Asocioj veku tiujn fortojn kaj utiligu tiujn eblojn."

Ĉu en via urbo aŭ vilaĝo oni jam utiligas iumaniere Esperanton en rilatoj kun via(j) ĝemelurbo(j)? Se ne, ni instigas vin aktiviĝi tiurilate, ĉar temas pri bonega ebleco montri la utilecon de Esperanto en praktiko. Tute aparte tio eblas koncerne la rilatojn inter civitanoj, ĉar ĝis nun la ĝemelaj rilatoj ofte restis sur la nivelo de urbaj aŭtoritatuloj.

Bonega okazo por komenci tiun ĉi agadon estas la Eŭropa Jaro de Lingvoj (EJL) en 2001, kiu estas komuna iniciato de Eŭropa Unio kaj Konsilio de Eŭropo (KdE). Kadre de tiu jaro estas rekomendinde ke Esperanto-kluboj realigos projektojn de ĝemel-urba agado kiuj entenos la jenon:

1. Celo: konsciigi pri la riĉeco de la lingva diverseco; kuraĝigi plurlingvecon; plibonigi ĝemelajn rilatojn, specife la interkomunikadon por pli bone konigi siajn kulturojn kaj instigi diversecon; montri ke la lernado de Esperanto plifaciligas la lernadon de la lingvo de la ĝemelurbo.
2. Uzo de Esperanto kiel instrumento kaj ĝia instruado al civitanoj en la koncernaj urboj en 2001 (printempo ĝis aŭtuno);
3. Organizo de korespondado (letere aŭ/kaj rete) inter partoprenantoj;
4. Post la Esperanto-kurso ambaŭflanka interŝanĝo de vizitantoj, kiuj loĝu ĉe civitanoj de la vizitata urbo;
5. Financa subteno por tia agado verŝajne estos pli facile ricevebla, se oni provos elekti specifajn grupojn (ekz. sportistoj, muzikistoj);
6. Se oni povos okazigi la projekton inter 3 anstataŭ 2 urboj, la ŝanco ricevi subvencion de EU aŭ Konsilio de Eŭropo estos eĉ pli granda.
7. Oni kontaktu universitaton aŭ altlernejon por esplori, ĉu la projekto interesas studento(j)n kiel temo de studlaboraĵo kaj ĉu ili eble povus helpi ankaŭ en alia maniero.

Oni nepre klopodu organizi la projekton oficiale, t.e. pere de la komunumo, kaj oni petu subvencion por ĝi. Oni klarigu, ke la lernado de Esperanto plifaciligas la lernadon de la lingvo de la ĝemelurbo. Oni atentigu, ke multaj civitanoj kun aĝo de pli ol 40/50 jaroj neniam havis ŝancon lerni fremdajn lingvojn. Ili povus lerni Esperanton kaj en malpli ol unu jaro atingi la kapablon paroli ĝin.

Por ĉiuj stadioj de la projekto oni povos peti subvencion: ekde la komencaj kostoj ligitaj kun la instruado (ekz. anoncoj en gazetoj pri la kurso, kostoj pro la ejo, honorario al instruisto) ĝis la kostoj pro la interŝanĝo de vizitantoj (ekz. pro luo de aŭtobuso aŭ aliaj veturkostoj).

### Kie peti subvencion?

1. Eŭropa nivelo:

   Se oni agas rapide, eblas ankoraŭ peti subvencion de la Eŭropa Komisiono, sed notu ke la limddato estas 15-a de februaro 2001. La pet-formularon en iu el la 11 oficialaj lingvoj de EU oni povas preni el la Interreto ĉe: http://europa.eu.int -/comm/education/languages/languages/actions/year2001.html

   Ĝi haveblas ankaŭ en la EJL-hejmpaĝo de KdE: http://culture.coe.int/AEL2001/EYL

   Se vi ne havas eblecon aliri Interreton, vi povas peti la formularon de la nacia kunordiganto de EJL en via lando. Komence de la formularo troviĝas detalaj instrukcioj kiel plenigi ĝin.

2. Komunumo: Se via klubo ne povos pretigi peton al EK ĝis la limdato, ne rezignu pri la agado! Se via urbo havas ĝemelurbo(j)n, ĝi supozeble havas buĝeton por subvencii agadojn de civitanoj kaj iliaj organizaĵoj en tiu kampo. Eventuale estas tia buĝeto por internaciaj rilatoj ĝenerale, aŭ oni povus peti subvencion el buĝeto por edukado, kulturo, junulara agado ktp. Informiĝu pri diversaj eblecoj en via urbodomo! Jam tiu unua paŝo, informiĝo, estas pozitiva, ĉar ĝi montras al oficialuloj ke esperantistoj aktivas pri seriozaj agadoj kaj ne restas nur en sia fermita rondo.

3. Fondusoj: Esploru ankaŭ pri privataj fondusoj, kiuj subvencias kulturan kaj internacian agadon. Kutime ili anoncas pri siaj subvencioj en tagĵurnaloj sed vi povas informiĝi pri ili ekz. en via urba biblioteko.

La projekto povus fariĝi eksperimento, kiu instigus la ĝemelajn urbojn uzi Esperanton pli grandskale en postaj jaroj.

Ni deziras sukceson al via projekto kaj restos je via dispono por respondi viajn demandojn kaj doni konsilojn. Bonvolu ne forgesi informi nin ankaŭ pri viaj rezultoj kaj spertoj!

Kun sinceraj salutoj,

*Osmo Buller kaj Hans Erasmus*

# ARANĜOJ

## INTERNACIA JUNULARA SEMINARIO

La 14-a Internacia Junulara Seminario, IJS okazas inter 13-19. 07. 2001 en Szombathely, Hungario. La temo de la ĉi jara IJS estas "Muziko" kiel internacia lingvo. La organiza teamo, la temo kaj la partoprenantoj garantias vere bonan, amuzigan, aktive ripozigan etoson dum la plej tradicia kaj plej granda mezeŭropa junulara aranĝo. Ankaŭ la ĉi jara IJS donas al la partoprenantoj surprizojn, ekskurson, iom da "tradicia akvumado" kaj dumnoktan dancadon ĝis la "preskaŭ-morto".

Haveblas perinterreta aliĝilo al IJS ĉe: http://www.esperanto.hu /hej.

Estas organizota karavano al la UK en Zagrebo, kiun eblas partopreni.

Pliaj informoj kaj aliĝo ĉe:

*Hungara Esperanto-Junularo*
*Pf. 87.*
*HU-1675 Budapest, Hungario*
*Rete: hej@math.bme.hu*

## SOMERKURSARO EN FINNIO

Somera Esperantosemajno okazos inter 01-05. 07. 2001 en la lando de miloj de lagoj en Valamo instituto, Heinavesi, ĉe bela lago en orienta Finnlando. Oni povas krom la enhavoriĉaj kaj altnivelaj kursoj rigardi la belegan pejzaĝon. La altnivelon garantias kursgvidantoj, Sylvia Hämäläinen el Finnlando kaj Atilio Orellana Rojas el Argentinio-Nederlando.

Pliaj informoj kaj aliĝo:

*Valamon Kansanopisto*
*Siltasaarenkatu 15 C 65*
*FI-00530 Helsinki, Finnio*
*Rete:*
*valamon.kansanopisto@valamo.fi*

## SCIENCA KAJ KULTURA FORUMO

La 5-a Danuba Scienca kaj Kultura Forumo, DESKF-5 okazos inter 07-10. 06. 2001. en Beograd, Serbio. La aranĝo celas unuavice Danub-regionajn esperantistojn sciencistojn, kulturkreantojn kaj esperantistajn organizojn, entreprenojn, turismejojn, eldonejojn, sed ankaŭ ĉiujn aliajn kies personaj, profesiaj, negocaj aŭ sciencaj interesoj koncernas lingvojn, tradiciojn, politikan evoluon, kulturan kaj ekonomian interplektiĝon, aŭ iun ajn aspekton de la ĉirkaŭdanuba geografia kaj kultura spaco kaj aplikadon de Esperanto en ĝi.

Pliaj informoj kaj aliĝo ĉe:

*Radojica Petroviĉ*
*Bul. Oslobodjenja 36.*
*YU-32000 Cacak, Jugoslavio*
*Rete: radp@ptt.yu*

## BICIKLAJ KARAVANOJ AL IJK

La Biciklista Esperantista Movado Internacia (BEMI) organizas tri biciklajn karavanojn al la Internacia Junulara Kongreso en Strasburgo, en julio 2001. Malfermataj al ĉiuj, neesperantistoj ankaŭ bonvenas. Dum tiaj karavanoj oni kutimas temdumi, foje sovaĝe, kio alportas al tiuj renkontiĝoj specialan etoson, tre amikeman, en kiu ĉiu sin sentas libera. Tiuj, kiuj preferas, tamen ja rajtas tranokti engasteje.



Oni organizas 5 karavanojn:

Norda karavano: Londono, Bruselo, Luksemburgo, Strasburgo;

Orienta karavano: Bresto, Varsovio, Berlino, Strasburgo;

Suda karavano: Barcelono, Liono, Bazelo, Strasburgo;

Okcidenta karavano: Vannes, Angers, Parizo, Strasburgo;

Postkongresa karavano: Stras-

# Kompleta monata kalendaro

*La kompleta jara listo de E-aranĝoj daŭre aktualigata de ni, troveblas en interreto http://www.eventoj.hu . Korektoj, aldonoj estas bonvenaj! Por ricevi txt-formatan version sendu mesaĝon (enhavo ne gravas) al la aŭtomato: kalendaro@esperanto.org*

**16-18.05.** Printempa Renkontiĝo de Esperantistaj Familioj, Xinyang, Henan-provinco, Ĉinio. Inf: Zhang Xuesong, Changtaiguan Dianguansuo, CN-464193, Xinyang, Henan, Ĉinio. Rete: deodaro@263.net

**17-21.05.** BARO en Bad Münder proksime al Hannover. Inf: Conny Tennstaedt, Gerokstrasse 5, DE-47053 Duisburg, Germanio. Rete: conny.tennstaedt@epost.de Telefono: +49-203-665297

**18-20.05.** SATEB semajnfino kaj jarkunveno en Barlaston. Inf: Wegdwood Memorial College, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DG, Britio. Tel: +44-(0)1782-372105, +44-(0)1782-373427, fakso: +44-(0)1782-372393. Rete: wegdwood.college@ staffordshire.gov.uk

**18-21.05.** 10-a Xinyang-a Teo-Festivalo de Ĉinio kun Simpozio de E-Komerca Konferenco, Xinyang, Henan-provinco, Ĉinio. Inf: Zhang Xuesong, Changtaiguan Dianguansuo, CN-464193 Xinyang, Henan, Ĉinio. Tel.: +86-376-8821553. Rete: deodaro@263.net

**19-23.05.** IFEF Postkongreso, banlokoj Karlovy Vary, Mariánské Lázné, Františkovy Lázné. Inf: KAVA-PECH, Petro Chrdle, Anglická 878, CZ-25229 Dobrichovice, Ĉehio. Rete: ifef-kongreso@kava-pech.cz

**24-27.05.** Piedmigrado en Bouresse. Gvidas Monique Dussenty, Thérèse Pinet. Inf: Kvinpetalo Esperanto-Centro, Rue du Lavoir, FR- 86410 Bouresse, Francio. Tel/fakso:+33-(0)5.49.42.80.74. Rete: kvinpetalo@club-internet.fr

**24-27.05.** Internacia Komunista Konferenco (IKEK) en La Chaux-de-Fonds. Inf: Kultura Centro Esperantista, CP 311, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando. Tel/fakso +41-32-9267407, Rete: kce.esperanto@bluewin.ch

**24-27.05.** 8-a Balkana Esperanto-Kongreso (BEK) kaj 7-a Balkana Junurala Konferenco (BAJK) en Vraca. Inf: Esperanto, p.k. 26, BG-3000 Vraca, Bulgario. Tel: +359-(0)92-24890 kaj +359-(0)92-21044. Rete: sukceso@dir.bg

**24-28.05.** Tagoj de Kijivo (Kievo). Inf: Mikaelo Lineckij, p.k. 140, UA-04201 Kijiv, Ukrainio. Tel. +380-44-4320743. Rete: urso@espero.freenet.kiev.ua aŭ Rete: lineckij@ukrpost.net

**25-27.05.** Boatado - Ignalina lagregiono. Inf: Klubo "Juneco", p.k. 61. LT-2000 Vilnius, Litovio. Inf: Tel: +370-2-758336. Rete: olga.ramenskaja@takas.lt

25-28.05. 49-a Kongreso de ELNA, en Sallaga Urbo (Salt Lake City). Inf: Esperanto-Ligo por Norda Ameriko, PO Box 1129, El Cerrito CA 94530, USA. Tel: +1-510-6530998, fakso: +1-510-6531468. Rete: elna@esperanto-usa.org

# FAKA APLIKADO

## TERMINOTEKO NE PLU?

La cirkulero pri terminologiaj problemoj nomita "Terminoteko" kaj redaktita de Bernhard Pabst aperis inter 1991-96 en 14 kajeroj. En presita formo aperis nur 12 kajeroj, ili estas troveblaj ankaŭ en la kompaktdisko "espRom".

Bedaŭrinde Terminoteko ne plu aperas, kvankam la neceso havi tian



cirkuleron estas pli granda ol iam ajn antaŭe. Eble iu daŭrigos? La kajeroj 13 kaj 14 neniam aperis surpapere, sed ekzistas en elektronika formo.

Volontuloj por daŭrigi la serion povas kontakti:

*Bernhard Pabst,*
*Hölscheider Str. 4*

## FESTIVALO DE VIDEOFILMOJ

La 5-a Festivalo de Videofilmoj okazas la 29-an de septembro 2001 en Maribor, Slovenio. Oni povas partopreni kun filmoj en du kategorioj: arta filmo, dokumenta filmo. Artaj filmoj ne estu pli longaj ol 10 minutoj, dokumentaj filmoj ne estu pli ol 15 minutoj.

Pliaj informoj kaj aliĝo ĉe:

*Esperanto-Societo*
*Besednjakova 1.*
*SI-2000 Maribor, Slovenio*

## KORESPONDA FAKA KURSO

Profesoro Jan Werner estas delonge fama en Esperantio pri la evoluigo de scienca kaj teknika terminologio kaj metodoj pri ties sistema evoluigo, pri kiu li verkis eĉ kurslibron. Post la Kolokvo pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (KAEST) aranĝita pasintnovembre en Prago, li planas pluan daŭran fakan agadon.

Li favorus koresponde instrui junajn fakulojn esperantistajn pri terminologiaj metodoj, por ke tiuj estu kompetentaj por sisteme prilabori terminologion pri sia fako private, sed ankaŭ por kontribui al tia laboro




enkadre de la iam aktiva, sed lastatempe, pro manko de partoprenantoj, laciĝinta TEC (Terminologia Esperanto-Centro). Interesatoj skribu al:

*Profesoro inĝeniero Jan Werner*
*Kroftova 84*

## ESPERANTO-MUZEO EN ĈESKÁ TREBOVÁ

La loka muzeo de Ĉeská Trebová kolektas informojn pri agado de kluboj, akceptas donacojn, precipe librojn kaj manuskriptojn. La bib-



lioteko posedas 6310 librojn ordigitajn jene: 1. Lernolibroj 2. Vortaroj 3. Gvidlibroj 4. Prozaĵoj 5. Poeziaĵoj 6. Kongresoj 7. Teatraĵoj 8. Binditaj gazetoj 9. Kantaretoj 10. Pri Esperanto 11. Sciencaj (fakaj) 12. Religio 13. Biografioj 14. Adresaroj 15. Politikaĵoj 16. Ceteraj. Ankoraŭ necesas enkomputiligi duoblaĵojn. La muzeo preparas bildkarton kun Esperanto-fako.

*el: Starto 2001/1*

## TERMINOLOGIA KUNSIDO DE FERVOJISTOJ

En novembro 2000 okazis terminologia seminario pri fervoja transporto kaj trafiko en Dobrichovice, Ĉehio sub aŭspicio de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio, IFEF.

## TUTMONDA KUNVENO PRI KOMERCO

Okazis ret-kunveno pri komercado ĉe la adreso www.komerco.com/babilejo la 24-an de marto 2001 inter 15:00-18:00 UTC.

*s-ano Wang Tianyi*

# INTERRETO

## LISTO DE RETLISTOJ

Estas registritaj jam pli ol 200 Esperantlingvaj retlistoj (alinome diskutlistoj, novaĵlistoj, distribulistoj) ĉe http://www.eventoj.hu.

La "Listo de listoj" estas grupigita al "ĉefaj, fakaj, lingvoinstruaj kaj ceteraj" blokoj, kaj enhavas ne nur la nomon, temon kaj adreson de la unuopaj listoj, sed ankaŭ teknikan klarigon pri la maniero de aliĝado.

Se vi trovas mankon en la supra listo, aŭ vi havas informon pri ekesto / modifo / nuligo de iuj listoj, estas bonvena via informo, kompletigo kaj korekto.

La "Liston de listoj" prizorgas redakcio de la retpoŝta Esperanto-novaĵservo "Ret-Info".

La revuo de Itala Esperanto-Federacio estas nun legebla en reto ĉe la adreso: http://www.esperanto.it/rivista.htm en formato PDF.

* * *

La fama fabelo "La Eta Princo" verkita de Antoine de Saint-Exupery, en Esperanto, kompleta teksto kun originalaj figuroj kaj ligoj al aliaj samaj paĝoj en diversaj lingvoj legeblas ĉe: http://www.utopia.com.br/esperanto/eta/

* * *

Reta versio de la revuo "Kelkfoje" legeblas ĉe: http://home.wanadoo.nl/janhut/kelkfoje

* * *

Ekfunkciis la retpaĝejo de Hilelista E-rondo ĉe: http://www.geocities.com/hilelistarondo, en kiu interalie oni povas trovi ĉiujn ĝisnunajn numerojn de la duonmonata bulteno de la rondo.

* * *

La retpaĝadreso de "La Esperanta Komputilfaka Centrejo" estas ŝanĝita. Ĝi nun estas atingebla ĉe http://www.peco.yucom.be/ekc/. Retadreso de La Esperanta Komputilfaka Centrejo nun estas: peco@yucom.be.

* * *

"Dessapt Pierre" (rete: dspt@club-internet.fr), kolektanto de malnovaj radio-aparatoj kompilis 3-lingvajn retpaĝojn pri la "Historio de la Radio".

# MOVADO

## VERKU STUDON PRI LA HISTORIO DE UEA!

Por ke venontaj generacioj povu bone informiĝi pri la problemoj de la Esperanto-movado en la 1970-aj jaroj, la studgrupo Perspektivo volas stimuli per konkurso la verkadon de studoj pri tiu periodo. La kvin plej bonaj studoj pri la influoj de tiuj problemoj sur la tiaman funkciadon de UEA ricevos premion de 500, resp. 400, 300, 200 kaj 100 USD - danke al pluraj personoj, ĉefe la japana mecenato Etsuo Miyoŝi.

La temo de la konkursaĵoj estu "Universala Esperanto-Asocio en la periodo 1970-1980". Ili ampleksu inter 10 kaj 50 paĝoj; la teksto estu Esperantlingva kaj klare legebla. Eblas partopreni individue aŭ kolektive, sed oni donu klaran indikon pri tio. La konkursaĵoj atingu Flandran Esperanto-Ligon antaŭ la 1-a de oktobro 2001.

La verkinto uzu kaŝnomon; en aparta koverto estu indikitaj la vera nomo kaj la adreso. Tri kvalifikitaj personoj (po unu nome de Perspektivo, s-ano Miyoŝi kaj UEA) pritaksos la verkojn per poentoj. La sekretario de Perspektivo redaktos la rezulton laŭ la poentumo kaj indikos la laŭreatojn. La studgrupo Perspektivo rajtos publikigi ĉiujn senditaĵojn.




*Pliaj informoj ĉe:*
*Flandra Esperanto-Ligo*
*Frankrijklei 140*
*BE-2000 Antwerpen, Belgio*
*Rete: uea@inter.nl.net*

---

Unesko

## MONDA RAPORTO PRI LINGVOJ - 2001

"Esperanto"-Radikalan Asocion por ĝia "ege rimarkinda kontribuo al la redaktado de la Monda Raporto pri la Lingvoj" - kiel oni povas legi en la letero akompananta tiun meritateston - "raporto, kiun Unesko eldonos dum la jaro 2001".

Tiu raporto, konsistanta de la unua kompleta kaj oficiala studaĵo pri la "sanstato" de ĉiuj lingvoj ankoraŭ ĝis nun parolataj en la mondo, estis prizorgita, dum la lastaj jaroj, far la Centro de Bilbao.


Tiu rekonsigno reatestas la prestiĝan pozicion de ERA inter la esperantistaj organizaĵoj, ankaŭ interne al la "sistemo UNESKO", kaj la gravecon de la kunlaborado de nia asocio kun tiu Organizaĵo.

*"ERA-Onlus"*
*Rete: e.r.a.@agora.it*

---

## RAPORTO PRI PACKULTURA TEJO-SEMINARIO

Kadre de la Internacia Jaro de Kulturo de Paco TEJO okazigis seminarion en Varna (1-8 septembro 2000) kun la temo "Balkana junulara agado por kulturo de paco". Ĵus aperis interesa 60-paĝa raporto pri ĝi. La raporto prilumas multfacete la laboron dum la seminario: prelegojn, laborgrupojn, vesperojn, ekskursojn kaj kontribuojn de partoprenantoj. Ĝi enhavas ankaŭ detalan enkondukon pri organizado de seminarioj.



Inter aliaj temoj oni trovas ampleksajn prezentojn pri Esperantio, Landa Agado, Financoj, Eksteraj Rilatoj, Amasaranĝoj (ekz. kiel organizi Lingvan Festivalon), Informado kaj Gazetaro. Tiel la raporto estas leginda ne nur por tiuj, kiujn interesas junulara laboro aŭ Balkano, sed ankaŭ por tiuj, kiuj intencas prepari aranĝon aŭ alimaniere aktivi ekz. en Esperanto-organizo.

Al la raporto kontribuis partoprenantoj kaj prelegantoj de la seminario, kaj ĝin kompilis ĝenerala sekretario de TEJO, Vlad'ka Ĉvatalova. Finredaktis ĝin Sabira Stahlberg kaj reviziis Aleksandar Ŝivarov. La raporto estas mendebla en la Libroservo de UEA kontraŭ EUR

## ESPERANTISTA INSPEKTORO ĈE RADIO

La 29-an de marto 2001 okazis en Budapeŝto elektoj de inspektoroj por Hungara Radio kaj Televido. Ankaŭ reprezentantoj de sociaj organizaĵoj rajtis kandidatiĝi. Laŭ la komisio de la estraro de Hungaria Esperanto-Asocio kandidatiĝis ankaŭ Oszkar Princz, ĝenerala sekretario de HEA.

Pro la granda nombro de la kandidatoj la koncernuloj decidis elekti el inter la kandidatoj per lotumado. Bonŝance Oszkar Princz estis elektita al la inspektoraro de Hungara Radio.

---

## TEJO-AKTUALE

Aperis nova retrevuo, kiel dissendolisto, TEJO-Aktuale. TEJO-aktuale estas senpaga ĉiusemajna retrevuo de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, TEJO. Ĝi publikigas nur kurtajn artikolojn kaj emas proviziigi adresojn de retpaĝoj (aŭ kontaktendajn personojn) kie troveblas pli da materialo.

Nur UNU fojon semajne, ĉiun lundon, ĝi dissendas kelkajn, elektitajn novaĵojn, interesaj por la junulara E-movado. Ĝi aboneblas senpage kaj ĝia tuta enhavo troveblas ĉe: http://www.esperanto.org /tejo/publikaĵoj/aktuale/paĝo.html.

Se vi volas kontribui al la revuo per novaĵoj, bv. direkti ilin al: tejo-

---

## KVIN BILDKARTOJ

Fine de 2000 aperis kvin bildkartoj en Ĉehio. Po unu estas el Znojmo kaj Ostrava kaj du el Česká Trebová. La kvina memorigas nin pri la centjara Esperanto-Klubo de Brünn (Brno) de aŭstriaj esperantistoj. Tio atestas ankaŭ pri la miksaj eŭropaj okazaĵoj, ĉar oni ja scias, ke Brno estas ĉeha urbo tamen aŭstriaj espeantistoj fondis la unuan klubon.

*el Starto 2001/1*

## KIO FURORIS EN LA ESPERANTO LIBROMERKATO EN 2000?

Al "Hejma vortaro" sukcesis en 2000 la sama raraĵo kiel al "Monumente pri Esperanto" en 1997: la unua loko en ambaŭ furorlistoj de la libroservo de UEA, tiu de totalaj kaj tiu de unuekzempleraj vendoj.

En la listo de totalaj vendoj ĉefe pezas la vendoj al aliaj libroservoj, kiuj siavice revendas parton de la akiritaj stokoj al individuaj klientoj nur en postaj jaroj. Plejmulto en tiu listo estas eldonaĵoj de UEA (17 el 20), tiel ke la listo de unuekzempleraj vendoj al individuaj klientoj donas pli fidindan ideon pri tio, kiuj titoloj vere estis la plej popularaj sur la Esperanta merkato.



Pro la malpli granda UK la vendoj en 2000 restis multe sub tiuj en 1999. En Tel-Avivo la libroservo enkasigis 37500 eŭrojn malpli ol en Berlino. Tamen la tuta volumeno de la vendoj (EUR 125433) estis nur 18100 eŭrojn sub tiu en 1999. En jaro de granda UK, parto de la regulaj klientoj aĉetumas en la kongreso anstataŭ mendi de la vendejo en la CO. En jaro kiam ili ne kongresas, ili mendas de Roterdamo. Sekve la tuta rezulto de la libroservo fluktuas malpli ol la vendoj en UK.

En granda UK la libroservo atingas ankaŭ klientojn, kiuj neniam mendas poŝte, sed tie ankaŭ la poŝtaj klientoj emas aĉeti pli. Reklamo aŭ kataloga priskribo ne same efikas kiel vidi la libron, preni ĝin en la manojn kaj foliumi ĝin. Tion montras ankaŭ la sperto de la Malfermaj Tagoj de la CO. En ĉiu Esperanto-aranĝo, ĉu eta aŭ granda, devus do esti almenaŭ modesta libroservo. Bedaŭrinde landaj asocioj tro ofte neglektas tion, por ne paroli, ke pli kaj pli multaj el ili ne plu havas libroservon, kvankam funkciigo de libroservo devus esti unu el iliaj bazaj taskoj.

En 2001 la libromerkato, ne nur la libroservo de UEA, ricevos ekstran impulson per la apero de nova, 190-paĝa katalogo de UEA. Ĝin ricevos senpage la Membroj-Abonantoj en pagipovaj landoj, ĉiuj honoraj kaj dumvivaj membroj, ĉiuj delegitoj, Esperanto-kluboj kaj la ceteraj klientoj de la libroservo. Krome ĝi estos aĉetebla por malalta prezo.

## KONKURSOJ

### FABELKONKURSO AL INFANOJ

La Instituto de Paatalo en la komunumo de Taivalkoski estas verkista edukcentro en Norda Finnlando. La Instituto aranĝis fabelkonkurson al finnaj infanoj ĉiujare jam ek de la 1994-a jaro.

La Instituto de Paatalo kaj la Vilaĝasocio de Metsäkylä aranĝis en la jaro 2000 la unuan tutmondan esperantlingvan fabelkonkurson al ĉiuj infanoj kiuj jam scipovas aŭ nur studas Esperanton. La konkurso bone sukcesis kaj nun okazas Fabelkonkurso 2001.

La kategorioj en la konkurso estas:

- A: ĝis 9-jaraj,
- B: 10-11 jaraj,
- C: 12-14 jaraj.

La konkursfabelo estu 50-150 vortoj en kategorio A, 100-500 vortoj en kategorio B kaj 200-1000 vortoj en kategorio C. La ĵurio aprezas la fabelecon kaj originalecon de la verkaĵo. En la skribado aŭ tajpado plenkreskulo rajtas helpi laŭ sia konscienco.

La celo de la konkurso estas, ke geknaboj interesiĝu pri la uzado de lernita lingvo, ke ili daŭrigu sian bonan hobion kaj ekzercu sian kreivecon.

La rezulton de la fabelkonkurso oni publikigos kaj anoncos fabeltage (18. oktobro), samtempe kun la rezultoj de la finnlingva fabelkonkurso, dum infansemajno.

La limdato estas la 31-a de julio 2001. Bonvolu, sendi viajn fabelojn por la konkurso al la jena adreso:

*La Instituto de Paatalo*
*PL 39.*
*FI-93401 Taivalkoski, Finnlando*

## MALLONGE

En Rusio okazis 2 gravaj aranĝoj inter 02-11. 03.: Rusia E-ista Kongreso kaj EoLA (Esperanto Lingvo Arta). La aranĝojn partoprenis entute 199 personoj el 11 landoj.

* * *

Kultura Societo de Staszow (Pollando), tute ne esperantista organizaĵo eldonis "Transpaŝi la Sojlon de L'Espero" de papo Johano Paulo la dua.

* * *

Okaze de la ĉi jara Universala Kongreso, UK estis farita "Kroata Esperanto frazaro". Surpaperigitan version de la frazaro oni povas mendi kontraŭ 3 internaciaj respondkuponoj (por la poŝtaj kostoj) ĉe: Mato Spekuljak, Ostarijska 8, HR-10000 Zagreb, Kroatio.

* * *

Klubo Esperanto en Znojmo (Ĉehio) festos 45 jarojn de sia ekzisto en junio. Por letervespero la klubo petas sendi salutojn en formo de bildkartoj al la adreso: Klub Esperanto pri DDM, Sokolská 8, CZ-669 02 Znojmo, Ĉehio.

* * *

En Maceio, Brazilio estis fondita nova Esperanto-Sekcio en Spiritisma Centro.

* * *

Okazis staĝo pri "Historio de Esperanto kaj didaktikaj konsiloj al instruantoj" inter 17-21. 04. 2001 en Kvinpetalo, francia Esperanto-centro.

* * *

Lige al Pasko la Papo en multaj lingvoj eldiras benon "Urbi et Orbi". De kelkaj jaroj inter la uzataj lingvoj troviĝas ankaŭ Esperanto.

* * *

Inter 9-14 de aprilo okazis kultura semajno en Ceg Anfame, kolegio en la ĉefurbo Lome de Togolando, kie la loka E-grupo de deko da junaj lernantoj sukcese prezentis E-on per ekspozicieto, kantoj, poemoj kaj similaj. La lerneja grupo estas kontaktebla ĉe: Ceg Anfame, Ireg Golfe, B.P. 80252 Lome, Togo

* * *

Aperis la 350-a numero de "Boletin", organo de Hispana Esperanto- Federacio. Kvankam, pro historiaj kaŭzoj, la nomo de la bulteno aperas en la kastilia lingvo, la tuta 32-paĝa bulteno estas en Esperanto, kun multaj informoj, fotoj, komikso kaj artikoloj.

* * *

Prezidanto de Kultura Asocio Esperantista, KAE en Sabadell, Hispanio s-ano Jose Maria Galofre Domingo estis koncedita al la Medalon de Honoro, kiel rekono al lia altnivela laborado por la urbo, en la decido rolis ankaŭ lia laboro

# INSTRUADO, ILEI

## KURSO DE ESPERANTO

"Kurso de Esperanto" estas komputila programo por lerni Esperanton. Ĝi estas frukto de multhoma laboro, kaj jen estas eldonita ĝia dua versio, kun multaj novaĵoj.

Ĝi haveblas en la lingvoj portugala, hispana, angla, franca, pola, norvega, itala kaj korea. Baldaŭ ankaŭ en la lingvoj ĉeha, finna kaj sveda. Bonvenaj estas tradukantoj al aliaj lingvoj. Al ĝi estas aldonitaj prononcekzercoj, la lernanto nun povas registri sian prononcon kaj kompari kun la modelo. En ĝi estas variaj voĉoj: nun 6 malsamaj voĉoj estas uzataj por ĝeneralaj frazoj kaj prononcaj modeloj. Estas aldonitaj sondosieroj por la lecionoj 5 kaj 6, kaj por la tekstoj kaj spritaĵoj de la lecionoj 4 ĝis 11. La frazaro estas reviziita.

La ĉefa menuo havas novan aspekton. Estos disponebla speciala versio por kursgvidaj servoj, por ekstudi novan lecionon la lernanto bezonos ŝlosilvorton.

Kurso de Esperanto furoras. Dum la lastaj monatoj la ĉefaj brazilaj komputadaj gazetoj publikigis la programon, kaj prezentis raporton pri Esperanto. Tiuj raportoj estis ĉiam favoraj, kelkaj eĉ uzis la tekston "Kio estas Esperanto?" de la Kurso mem.

Interesitoj kontaktu min pri tio.

*Carlos A. A. Pereira*
*Rete: casainfo@zaz.com.br*

# KULTURO

## ESPERANTO MUZIKALO

La unua - kaj ŝajne ĝis nun la sola - Esperanta muzikalo (vidu en Eventoj n-ro 131, 133 kaj 150) estis prezentita profesinivele kun bomba sukceso en pluraj Esperanto-aranĝoj i.a. ankaŭ en IJK en Assisi, Italio kun ĉ. 30 rolantoj.

Danke al la moderna tekniko oni povas ĝin ree kaj ree ĝui en videokasedo. La filmon prizorgas Pier Luigi Cinquantini, Italio. La kasedo haveblas en tre bona kvalito en formato VHS. Ĝi estas aĉetebla kontraŭ 24 EUR.

Pli informoj ĉe:

*Pier Luigi Cinquantini*
*Via D. Alighieri 2.*
*IT-01010 Blera, Italio*
*Rete: pcinqua@tin.it*

# ANONCETOJ

Pro kunfandiĝo de bankoj la bankokonto de Hispana Esperanto-Federacio ŝanĝiĝis al: 0182-2552-61-0204011961.

Mi daŭre kolektas aboco-librojn en diversaj lingvoj kaj estus ĝoja ricevi de vi kontraŭ pago aŭ interŝanĝe en la via. Por la momento mi havas en la lingvoj: ĉuvaŝa (2), itala (1), nepala (1), nevara (1), rusa (3), serba (3). Adreso: Aleksandr Blinov, pr. I Jakovleva 10A-63, RU-428027 Cheboksary, Rusio, rete: esperant@chtts.ru.

Konataj rusiaj aktivuloj Grigori Arosjev el Moskvo (eksa TEJO-estrarano) kaj Jelena Katajeva el Siberio geedziĝis la 30-an de decembro. Plej korajn bondezirojn kaj gratulojn!

Por eviti publikan diskuton, mi private sendos al ĉiu petanto dokumentojn, kiuj atentigas pri maletikaj agadoj en la esperantista tendaro - raŭmismo kaj Civito. Por pliaj detaloj, skribu al: G. C. Fighiera, ADRESO, rete: giancarlo.fighiera@libero.it.

# KORESPONDADO

15 diversaĝaj gelernantoj de la Esperanto-Departemento de la Spiritisma Centro William Crooks, deziras korespondi grupe kaj individue. Oni volas interŝanĝi ankaŭ korespondaĵojn. Adreso: Hugo Sandes Torres, C. Espirita William Crooks, Av. Siqueira Campos, 629 - Prado - Maceio - AL-57010-000 Brazilio. Rete: hugosandes10@hotmail.com

Mi volas korespondi, por ke mi havu amikojn. Mi nomiĝas Massimo kaj mi loĝas en Teramo, Italio. Adreso: Massimo Ripani, via cona lotto r/10, IT-64100 Teramo, Italio. Retdareso: xenoitaly@hotmail.com.


Du fratinoj (14 kaj 17) deziras korespondi kun gejunuloj (12-20 jaraj) el la tuta mondo. Interesoj: muziko, filmoj, televido, vojaĝoj, korespondado, interŝanĝo de belaj revuoj (pri steloj), bildoj, lingvoj, kantoj. Adreso: Irina kaj Jana Kizenko, abonkesto 1291, RU-354000 Soĉi, Rusio. Rete: narspi@soĉi.ru.

# RADIO

## POPULARA E-ELSENDO

La jaro 2000 estis tre bona por brazila esperantista radioprogramo "Esperanto, Lingvo de Frateco", dissendita de la radiostacio Rio de Janeiro.

La programo estas la 6-a plej aŭskultata inter 21 aliaj radioprogramoj en sama horo en la urbo Rio de Janeiro. Gajeco, novaĵoj, novaj programeroj kaj diversaj artistoj invititaj estis kelkaj el la kialoj de tiu ĉi sukceso.



# LIBROJ

## ESPERANTO-LERNOLIBRO POR ARABOJ

Lernolibro de Esperanto por arablingvanoj estis de longe dolore bezonata. Kelkaj tiaj siatempe aperis, la unua jam en 1907, sed post la elĉerpiĝo de la lernolibro de Nassif Isaac el 1970 arabaj interesitoj estis devigitaj uzi alilingvajn materialojn. UEA alfrontis tiun problemon kiel bremson al la lastatempa agado por disvastigi Esperanton en la araba mondo. Ekde nun tiu agado povas disvolviĝi pli facile danke al la nova "Kurso de Esperanto, Lingvo Internacia" de Georgo Abraham, ĵus eldonita de UEA.

La nova 130-paĝa libro konsistas el tri partoj: dek-leciona kurso kun ekzercoj, legaĵaro kaj konciza vortareto Esperanto-araba. La libro estis prespretigita de la Instituto Sabz Andishan en Irano, kiu kompostis ankaŭ la pli frue aperintan "Klara vortaro Esperanto-araba" de Abraham kaj nun pretigas la alidirektan, pli ampleksan vortaron de la sama aŭtoro.

La lernolibro de Abraham aperis kadre de Kampanjo 2000. La eldonon subtenis s-ro Heinz Schindler el Germanio kaj Subvencio Cigno.

La libro mendeblas kontraŭ 6,90 EUR de:

*UEA*
*Niuwe Binnenweg 176*
*NL-3015 BJ. Rotterdam, Belgio*

## "EVENTA LUDKVIZO"

Ĉiuj ĝustaj respondoj valoras 2 poentojn. Ĉiuj ludantoj, atingintaj 50 poentojn ricevas premion. Resendu la solvojn al la redakcio rete, letere, fakse.

**1. Kio estas la profesio de Zamenhof?**

A. Okulkuracisto

B. Lingvisto

C. Lingvoinstruisto

**2. Kiu(j) decidas pri la loko kaj dato de Internacia Junulara Kongreso?**

A. La estraro de TEJO

B. TEJO-komitatanoj

C. La estraro de UEA

**3. Kiu(j) verkis la libron "Parnasa Gvidlibro"?**

A. Kolomano Kalocsay

B. Kolomano Kalocsay kaj Gaston Waringhien

C. Kolomano Kalocsay kaj Julio Baghy

Limdato por alsendo: la 1-a de junio 2001. Ĝustajn solvojn vi trovos post 2 numeroj.

Ĉiuj, kiuj atingas la 50 poentojn, ricevas iun E-rilatan donacpremion - libron, sonkasedon, videokasedon, ktp.

* * *

Respondoj al la demandoj aperintaj du numerojn antaŭe.

**1. Kio estis la nomo de la unua esperantlingva gazeto?**

B. Esperantisto

**2. Kion signifas la mallongigo INA?**

A. Internacia Naturkuraca Asocio

**3. Kio estas la titolo en Esperanto la plej fama novelo de A. A. Milne (trad. Kellerman Reed)?**

B. Winnie-la-Pu

* * *

*Ni invitas vin, ludu kun ni!*


*EVENTOJ,* Nyt. sz.: B/TSZL/85/1991. ISSN 01215-959 X
A szerkesztőség címe: HU-1675 Budapest, pf. 87.
Tel./fax: 282-88-85. E-posta: eventoj@esperanto.org
http://www.eventoj.hu/
Megjelenik kéthetente.
Nyomás: SZELKER Bt. HU-1149 Bp, Fogarasi u. 17/A
*EVENTOJ,* internacia gazeto pri la Esperanto-movado, en kunlaboraj rilatoj al Hungara E-Asocio.
Eldonas LINGVO-Studio. Redaktas: Axel Ország-Krysz
Oficeja kunlaboranto: István Mészáros.
Respondeca eldonanto kaj ĉefredaktoro: László Szilvási.
La redakcio ne nepre konsentas pri la enhavo de unuopaj artikoloj, kaj ne respondecas pri la anonc-enhavoj.
Abonkotizo: 34, aere 40 EUR al la UEA-kodo ELLS-S.

## INTERESE

### INTERRETO-LINGVO.

Kiom da paĝoj en la reto vi estis forlasinta pro tio, ke sur ili estis skribitaj per strangaj signoj nekompreneblaj frazoj kaj ŝanĝo de kodosistemo tute ne plibonigis la situacion? Eble, tiu literaturaĵo estis skribita ĉin-lingve? Certe, ekzistas "ĝenerale-akceptita" lingvo - angla, sed oni ja devas dekomence lerni ĝin.

En Instituto de UN pri perspektivaj esploroj (United Nations Institute of Advanced Studies) estas ellaborita universala lingvo por komunikado en Interreto - Universal Networking Language (UNL). Programo-kodigilo tradukos ĉiujn senditajn mesaĝojn al UNL kaj en tiu stato ili "vojaĝos" laŭ la reto kaj en komputilo de adresito ĉiuj alvenantaj mesaĝoj denove estos tradukataj, sed jam al nacia lingvo de ricevanto. Kreintoj de la lingvo emfazas, ke plej taŭgaj por similaj manipuloj estas teknikaj tekstoj. Rusio estos unu el 6 landoj, por kiuj estos produktitaj programoj-kodigiloj.



Jam delonge estas pridiskutata problemo: "Al Internacia Reto - Internacian Lingvon!". Sed lingvistoj de UN preferas denove "inventi biciklon", ne atentante al projekto, ekzistanta jam pli ol cent jaroj! Eble ili neniam aŭdis pri Esperanto? Laŭ mi, indus amase reehi al tiu projekto de Instituto de UN pri perspektivaj esploroj (United Nations Institute of Advanced Studies).

### REJKJAVIKO ELEKTIS LA ANGLAN

Per kreskanta premo de la angla lingvo, la 270 000 loĝantoj de Islando ege "bone" parolas la anglan, specife la plej junaj. Sendube pro tio, multaj islandanoj studas eksterlande. Lastatempe, la registaro timas ke studentoj ne revenas al vulkana kaj malvarma Islando post studado. Islandaj entreprenistoj ankaŭ timas perdi estontecajn dungitojn, kiuj restas eksterlande. "Studi eksterlande por postuniversitataj studoj estas bona. Nur ili revenu" - diras profesoro Bjarnadottir de la Rejkjavika Universitato. "Ni konkurencas kun la resto de la mondo por doni al homoj la ŝanco kontinui vivi en Islando" - diras profesoro Jonsdottir.

Rejkjavika Universitato, la sesa universitato en Islando, nun havas solvon. Ĝi instruos angle al studentoj el Islando kaj aliaj landoj.

"Ni estas en la mezo de la Atlantiko. Ni havas malfermitajn pordojn al Usono, Kanadio kaj Eŭropo" - fiere diras profesoro Jonsdottir. Sed ĉu Rejkjavika Universitato havas mafermitajn pordojn al islandanoj kiuj volas studi islande?

*Ndeba Ugushi*

### ŜERCOJ

- Sinjoro kelnero, la kotleto estas tro malmola, mi kapablas formordi el ĝi eĉ ne unu peceton. Venigu al mi la ĉefon!
- Vana klopodo, ankaŭ li ne kapablos.

* * *

- Diru al mi, kio estas la diferenco inter fulmo ka elektro?
- La fulmo estas senkosta, dum la elektron necesas pagi.

* * *

- Sinjoro kajestro, ĉu la trajno ankoraŭ veturos?
- Sendube, la reloj ankoraŭ kuŝas sur sia loko.

* * *

Monologo de enamiĝinto:

- Ŝi estos venonta je la tria, nun estas la kvara, mi atendos ĝis la kvina, kaj se ŝi ne venos ĝis la sesa, mi iros je la sepa hejmen.

* * *

- Kio estas la ĉefa parto de la ĉevalo?
- La felo.
- Kial vi opinias tiel?
- La felo tenas la tutan ĉevalon kune.

* * *

Sensignifa verkisto fanfaronis en societo, ke li naskiĝis en la sama tago, kiam mortis Puŝkin.

- Vere trista tago por la rusa literaturo! - rimarkis unu el la ĉeestantoj.

*laŭ Marta Lorková*
*el Starto*